

PREZO: 1:50 Kr.

Löfdquist, Tierp 1952

MALGRANDA REVUO

Nro 3 • 1952

10a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Esperanto en la ĉiutaga vivo, komentoj	65
Ludwig Börne, de Josef Sommer	70
La karbonaroj kaj miaj oreloj, de Ludwig Börne	73
Kantoj de l' neĝa kabano, de Poul Thorsen ..	82
Eskimaj kantoj	83
Bridi la naturelementojn, de J. Kohen-Cedek..	85
Debato	89

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).
Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas
ilin afranko por resendo.

Perantoj

Beljujo: Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen.

Flandra Esperanto-Instituto, Blankenberge Steenweg 72,
Brugge.

Brasilien: Brazila Esperanto-Ligo, Praça da Republica 54—1,
Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth
(Herts).

Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.
Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Lakse-
gade 35, Kopenhago K.

Finlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,
Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,
(13 b) München-Pasing.

Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.

Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Jugoslavio: Sro Kralj Drago, Rozna dolina 6—22, Ljubljana.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.

Norvegujo: Esperantoforlaget A/S, Boks 492, Oslo.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nowa Sol.

Portugalujo: Sro A. P. da Silva, Rua 48 nro 7—3 Alvalade,
Lisboa.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Sro Arthur S. Kane, 725 B East Chevy Chase, Glen-
dale 5, California.

MALGRANDA REVUO

Nro 3

10a JARO

1952

Esperanto en la ĉiutaga vivo

Komentoj al la artikolo en nro 2/1952.

1.

Mi plezure studis la artikolon de sro Kuder-Mátéffy. La vid-
punktoj de tiu estimata verkisto estas tiuj de veterano kaj
ĉiutaga uzanto de la lingvo. Malfeliĉe (kaj aliflanke feliĉe)
oni povas pli rapide nombri la veteranojn ol la novbakitojn.
Unu el tiuj estas mi, ne juna sed nova en esperanto. Duone
instruita pri mia propra lingvo mi tamen trovis la esperantan
facila (kompare kun mia gepatra).

Sed kiam mi komencis esplori la esperantaj gazetojn, mi
rimarkis, ke oni ofte diskutas pri esperanto. Iuj volas, ke oni
en kelkaj okazoj uzu akuzativon, aliaj, ke oni ne uzu ĝin tie.
Kelkaj trovas malbona tion, kion aliaj trovas rekomendinda.
Kelkaj kritikis la supersignojn, aliaj postulas novajn vortojn
anstataŭ malnovaj ktp. Tio senluziigis min.

Kiam mi komencis skribi, mi petis miajn korespondantojn
korekti miajn leterojn. Blindulo petas helpon de unuokulaj.
Kiam mi provis skribi artikoletojn por mia loka gazeto, mi
petis korektojn de unu, du, tri lertaj amikoj. Mi konstatis,
ke se mi estus sendinta la manuskripton unue korektitan al
dua korektanto kaj poste al tria, mi ne estus rekoninta mian
skribajon en ĝia fina formo.

La lingvo tiel montriĝis pli kaj pli malfacila kaj mi preskaŭ
hezitis, ĉu mi daŭrigu. Ĉar mi havas deziron scii pli, mi tamen
ne haltis sed rediris al mi la vortojn de sro Manders: "Kiu
per esperanto sukcesas facile komprenigi sin al alilingvanoj,
tiu plene atingis la celon, por kiu Zamenhof kreis la lingvon."

Sed diru, kiom da personoj forlasas esperanton vidante multajn malfacilaĵojn neatenditajn!

Esperanto devas esti lingvo ne nur de lertuloj sed de la pli multaj homoj, eĉ simple instruitaj. La zamenhofa lingvo estas alloga per simpleco, reguleco kaj neampleksa vortaro. Oni devas ne ŝanĝi la zamenhofajn regulojn kaj ne pligrandigi nenecese la vortaron... ĝis la homaj cerboj ne plu bezonas simplecon.

Mi konsentas, ke esperanto pro manko de iuj lingvaj materialoj ne en ĉio egalvaloras al naciaj lingvoj. Tamen s-ro Kuder-Mátéffy, uzante nur vortojn entenatajn en la vortaro, sukcesis bone komprenigi sin en artikolo, kies temo estas pli ampleksa ol ĉiutagaj!

R. Olivaux, Francujo.

2.

En N:ro 2/1952 de MR mi interezite studis kaj pripensis la artikolon de E. Kuder-Mátéffy pri "Esperanto en la ĉiutaga vivo", kaj jen mi petas permeson mallonge esprimi mian penson pri tiu temo.

Taŭgan fundamenton por diskutado ni ja havas en la konsento, ke la esperanta gramatiko estas ĉiel perfekta. Ĉion mi ne povas pritrakti, do nur kelkajn gravajn punktojn mi tuŝos.

1) La adjektiva formo en la frazo, "Estas rimarkinda kiel subite ŝanĝiĝas la aspekto", estas tute pravigebla per la eliziita vorto "tio", eĉ se la eliziado okazis nekonscie.

2) La longeco de esperanto estas fabelo. Traduku libron aŭ nur unu paĝon da teksto el nacia lingvo en esperanton, kaj vi nepre trovos, ke la plia aŭ malplia longeco dependas ne de la lingvo sed de la tradukanto. Por la ĉiutaga vivo oni ne imitu la naciajn esprimojn sed serĉu esperantajn, kiujn oni ofte facile povas mallongigi. La esprimon: "Tio estas vera", oni povas mallongigi per elizio de la verbo je "tio vera", kio donas eĉ pli fortan aklamon.. Aŭ oni povas simple diri nur: "vere".

3) La "mal-vortoj" nedisputeble estas granda avantaĝo por la lernado de esperanto, eĉ se kelkfoje tia esprimo donas sen-

ton de surogato por "vera vorto". Tamen surogato estas nepre bezonaĵo por malriĉulo, ankaŭ el lingva vidpunkto. Ne forigante la "malvortojn" oni do singarde kaj pripense apudmetu novajn, kie tion postulas nepre, aŭ almenaŭ sentebla, bezono. Tia procedo ja estas tute laŭ la Zamenhofa ideo pri evoluo de la lingvo. Oni nur bridu troan fantazion.

4) Traktado de verbaj radikoj kiel de substantivaj: En la donitaj ekzemploj mi plene konsentas kun la aŭtoro, sed konstatas ke la problemo estas ne tute simpla. Altrudiĝas nepre la regulo, ke la diferencigon inter vortklasoj faras ne la radikoj sed la finaĵoj. Tiu regulo tamen estas aplikebla nur, kiam tion permesas la signifo. En tiu lasta okazo, ne povas esti eraro, se oni, aplikante la regulon pri nepre bezono kaj sufiĉo, anstataŭigas la sufikson "ilo" per la finaĵo "o". Do la vortoj "hako, sego, plugo, raboto, pumpo, ŝovelo" estas pli konvenaj kiel nomoj de la konkretaj laboriloj aŭ kiel abstraktaj nomigoj de funkciado, kion oni, se bezonate, pli bone kaj kompreneble povas nomigi per vortkunmeto. Ŝajne la diableto de tiu ĉi demando sin kaŝas en la fakto ke, pro la konstruo de la naciaj lingvoj, Zamenhof en sia vortaro redonis la signifojn de la esperantaj radikoj per plenaj vortoj.

5) Oportuna estus enkonduko de "alia" en la korelativan tabelon. "Alia homo", laŭ la nuna kutimo, ja povas signifi kaj alispeca homo kaj aliulo. Se homgrupo prigapas interbatalon, oni ne rajtas paroli pri batalantoj kaj aliuloj. Se oni ne volas diri "aliaj", oni faru vortkunmeton.

6) Pri la uzo de esprimoj, kiaj "estintus", "farintus" k. t. p. mi povas nur diri, ke tio memorigas stratbuban slangon.

Fine mi esprimu mian simpatian al la gesinjoroj, de mi nekonataj, kiuj dum jardeko tiom elprovis la praktikecon de nia lingvo. Jen veraj esperantistoj, kiaj donas naturan vivon kaj animon al nia movado.

Hj. D—n, Svedujo.

3.

En la artikolo "Esperanto en la ĉiutaga vivo" de s-ro Kuder-Mátéffy en n-o 2a de M. R. evidentiĝas, ke en la ĉiutaga

uzado de la lingvo la aŭtoro spertis ĝenon de iaj vortoj kaj esprimoj, kiujn li dezirus anstataŭigi per pli oportunaj. Mi supozas, ke la aŭtoro ne estas la sola esperantisto, kiu havas tiajn spertojn. Sed s-ro K.-M. malatentas du gravajn aferojn: 1e, ankaŭ en la naciaj lingvoj ekzistas iaj ĝenaj esprimoj kaj vortoj, kiujn oni en la ĉiutaga vivo aŭ neglektas aŭ kripligas, sed neniu aŭdacas proponi forigi la korektajn formojn el la skriba lingvo; 2e, gustoj kaj preferoj, ankaŭ sur lingva tereno, multe interdiferencas; kaj kio plaĉas al unu, tion alia evitas aŭ forĵetas malŝate.

Pri malatento de tiu dua fakto atestas liaj diversaj proponoj kaj preferoj, pri kiuj s-ro K.-M. evidente opinias, ke ĉiu esperantisto laŭ sia sperto akiris la saman opinion. Tio certe ne estas ĝusta. Ekzemple por radikvortoj anstataŭ la mal-kunmetaĵoj multe pledis literaturistoj, sed en la ĉiutaga praktiko de la lingvo ne aŭdiĝis pri tio plendoj. Kaj mi mire demandas min: kio gena ekzistas en la interlitero a en la vorto "nigra-hara"? Male, la interlitero en pluraj kunmetitaj vortoj estas ĝojiga afero, ĉar oni laŭplaĉe povas ĝin uzi aŭ ne uzi.

La propono de s-ro K.-M. por neologismoj ĉerpitaj el la germana lingvo ne konformas al la evoluo de Esperanto, kiu iru paralele kun la evoluo de ĉiuj kulturlingvoj. Ni ja konstatas, ke en la kulturaj lingvoj de tag' al tago aperas novaj vortoj, sed ĝenerale tiuj vortoj estas latindevenaj, malofte germandevenaj. Kaj ni jam spertis, ke germandevenaj neologismoj ne estas aplaŭde akceptataj; memoru la ofte proponitan, sed neniam akceptitan "darfi". Cetere, la internacia karaktero de Esperanto neniel suferos pro neglekto de radikoj el ĝermanaj, slavaj, finn-ugraj aŭ aliaj lingvaj familioj.

Plej mirige en la artikolo de s-ro K.-M. estas, ke li prezentas kelkajn personajn preferojn kvazaŭ jamajn faktojn. Li ekzemple asertas, ke ni jam enkondukis vortojn kiel "hako, sego" k. s. anstataŭ la korektaj formoj "hakilo, segilo" k. t. p. Eble la aŭtoro kaj kelkaj aliaj permesis al si tiujn mallongajn formojn, sed tio ne signifas, ke ni, t. e. la esperantistaro ĝenerale, enkondukis ilin.

Same nevere estas, ke oni jam uzas participoverbojn kiel "faritas, estintus" k. s. Tiuj formoj estas eĉ en la literaturo

maloftegaj, sed en la ĉiutaga vivo ili neniam akiros civitanan rajton.

La precipa eraro de s-ro K.-M. tamen estas, ke li rezonas pri la ĉiutaga lingvo kvazaŭ pri la literatura aŭ teĥnika. Por literaturo kaj teĥniko oni povas proponi specialajn formojn kaj vortojn, atendante, ke oni akceptos aŭ ne akceptos ilin. Sed tiu metodo ne estas aplikebla al la ĉiutaga lingvo, kiu ne lasas al si trudi ion novan, nek akceptas proponojn. Male, en la ĉiutaga lingvo esprimoj kaj vortoj per si mem estiĝas kaj enkondukiĝas, sendepende de tio, ĉu ili estas korektaj aŭ ne. La tasko de lingvisto estas konstati kaj registri tiujn novajn formojn; sed se li kredas, ke lia tasko estas helpi per proponoj kaj enŝovo de personaj preferoj kaj ideoj, li nepre eraras.

G. J. Degenkamp, Nederlando.

4.

Multe min ŝokas la artikolo de K.-Mátéffy en MR 2/52. Do, post tridek jaroj de esperanta uzado en ĉiaj cirkonstancoj mi devas nun ekscii, ke por la intima, endoma vivo Esperanto ne taŭgas. Se io ajn povus ŝanceli mian kredon je Esperanto, estus tia fakto. Mi konsideras la opiniojn kaj agadmanieron de la aŭtoro tiel gravaj, ke ĉi-foje mi ne transdonos vian revuon al miaj lernantoj por legi, ĉar ili ne devas scii, ke inter Esperantistoj troviĝas tiuj, kiuj, spitante la klaran averton de Zamenhof, tuŝas la Fundamenton, kaj tion farante, subfosas la tutan Movadon. Se Esperanto iel ne taŭgas, la korektado apartenas ne al unuopaj Esperantistoj, sed al la jam tiucele starigita organizaĵo. Vane diri, ke temas nur pri enfamilia parolmaniero: de la privata domo tiaj mis- kaj fuŝ-esprimmanieroj sin transplantos eksteren por konkurenci kun la akceptitaj formoj, naskante konfuzon inter la Esperantistoj kaj mokridadon inter la skeptikuloj. Ĉu ni ne estas sufiĉe avertitaj de la sorto de Ido?

Bone povas esti, ke transportite el la prelegejo kaj aliaj publikaj lokoj en la kuirejon kaj la dormĉambron, Esperanto unue sentigas mankon, ne de vortoj, sed de vortkono; sed la solvon oni devas serĉi en la kadro de Esperanto mem, kia ĝi

jam de 65 jaroj estas. Ŝanĝi la lingvon ne estas solvo; estas lingvistika mem-mortigo. Jen kion faras Gesinjoroj Kuder-Mátéffy; aŭ pli ekzakte, ili murdas nian Esperanton. Certe ili prunteprenis multon el la lingvo de Zamenhof; sed ili ne flatu sin, ke ili parolas Esperanton. Lingvo Internacia ne povas havi "argot".

D. B. Gregor, Anglujo.

Ludwig Börne

De Josef Sommer

Se viro, kiu propre estis politika verkisto, precipe do publikisto pri aktualaĵoj, pli ol cent jarojn post sia morto ankoraŭ estas menciata en eĉ plej koncizaj enciklopedioj, oni pravas konkludi, ke li estis neordinara, rimarkinda homo. Tia estis Löb Baruch, naskita 1786 en Frankfurt apud Main. Lia juda-ortodoksa patro, makleristo pri monŝanĝo, deziris, ke la filo studu medicinon. Sed post kelkaj semestroj tiu anstataŭigis la fakon per tiu de "kameralia" (scienco de administraj, financaj kaj priŝtataj aferoj).

En 1811 li fariĝis aktuario (protokolisto) ĉe la policedirekcio de sia naskurbo. Sed fine de 1813 la grandduklando Frankfurt, fondita de Napoleono, likvidiĝis, kaj la urbo reakiris sian antaŭan aŭtonomecon de "libera urbo". Tio revalidigis ankaŭ la antaŭajn apartajn leĝojn, kiuj malpermesis, ke judo okupu publikan oficon. Sekve B. estis kontraŭvole pensumata.

Mi mencias tiun detalon, ĉar probable la eksoficistigo postlasis en lia animo amaron iagrade kaŭzecan pri lia poste evidenta specifa menseco, kiu sin manifestis per konsekvenca malama kritiko kontraŭ la nasklando, precipe kontraŭ ties regantaj kaj ceteraj personoj influaj en la spirita, politika kaj socia vivo.

B. komencis sian publicistan karieron per tio, ke li skribis plurajn memuarojn en la intereso de la emancipaspiroj de la Frankfurta judaro. Por ne mem esti ĝenata kaj por povi pli

libere verki, li kristaniĝis en 1818 kaj sin nomis de nun Ludwig Börne.

Li fondis periodaĵon "Die Zeitschwingen" (la tempoflugiloj), presatan en Offenbach, sed la grandduka-hesa registaro post nelonge ĝin sufokis. Anstataŭe li redaktis gazeton "Die Waage" (la pesilo), folioj por burĝa vivo, scienco kaj arto. En ĝi li komencis publikigi serion da disertaĵoj kaj kritikoj, per kiuj li akiris famon de sprita opozicia verkisto.

Dume li konatiĝis kun la franca liberalismo, sed la reakciaj aŭ konservativaj tendencoj en la tiama Germanujo trudis al li, vuali la politikan kritikon kaj satiron per vesto de pseŭdo-beletraj aŭ felietonecaj traktaĵoj.

La morto de lia patro en 1827 donis al li la materian sendependecon de longe aspiritan, kaj nun li eldonis siajn "kolektitajn verkaĵojn" (kritikojn, satirojn, humoraĵojn kaj disertaĵojn). Ili trovis grandan legantaron kaj vivan intereson.

La sciigon pri la Pariza julia revolucio de 1830 B. akceptis kun entuziasmo, kaj en la aŭtuno li iris al Parizo, kiu ŝajnis al li kvazaŭa Mekka de la politika libero. De 1832 li pordaŭre tie ekloĝis. Kvankam la iro de la aferoj en Parizo ne respondis liajn atendojn kaj dezirojn, li pli kaj pli fremdiĝis antaŭ la hejmlando. Li sin enmanovris en pasian malŝaton ne nur al la efektivaj malfortaĵoj, malsaĝoj kaj mizeroj de la tiama germana vivo, sed eĉ al la karaktero kaj ecaro de la popolo mem, al kiu li riproĉis i. a. troservemon antaŭ ĝiaj princoj kaj mensan inerton. Pri tiu gala, pikema sinteno certe kulpis ankaŭ lia progresanta fizika kadukiĝo; jam en 1837 li mortis. Oni enterigis lin en la tombejo Père Lachaise.

En la verkoj de B. superregas la politika patoso de la nepra sindono al la ideo de la libereco, kia li ĝin konceptis. Tiu ideo komence kongruis kun la doktrino de la tiama franca liberalismo, poste kun la politika radikalismo. Eĉ la multnombraj priliteraturaj kaj teatraj kritikoj servis al li kiel rimedo por propagandi sian politikan ideologion. Kvankam tute ne mankis al li subtila perceptopovo al poezia belo kaj trafa juĝo pri teatraĵa artismo, li traktis ĉian alian koncepton kaj rigardmanieron per sofisma arbitro kaj netoleremo. Tiamaniere li akre atakis la eminentulojn de la germana spirita vivo, i. a.

Schiller kaj precipe Goethe, sed en vero li celis la tiaman Bundestag (federacian parlamenton) kaj la patriarkecan reĝimon de iuj etŝtatoj.

Malgraŭ tio la spritplena akreco kaj plaĉeco de lia eleganta, malkomplika stilo altiris multajn legantojn, eĉ tiajn, kiuj aprobis nek liajn politikajn, nek estetikajn principojn.

Sed desegnante la mensecan portreton de Börne ni dece aprezu ankaŭ la simpatiajn trajtojn. Eĉ liaj kontraŭuloj, almenaŭ la objektivaj juĝantoj, ne kontestis la integron de lia morala vivo, nek la purecon de lia karaktero. La motivo al lia agado neniel estis ia ajn profiteco, eĉ ne persona ambicio. Lia alta humaneco ĉie sin montris, kie ne kontraŭis lia netolerema doktrinismo.

Ankaŭ ni devas rigardi lian revoluciemon ne abstrakte, sed en la kadro de la tiamaj cirkonstancoj. B. ja vivis en epoko, en kiu la reakcio per rigora cenzuro paralizis ĉian movon al emancipo kaj liberalismo. Sufiĉas atentigi pri la fakto, ke la Bundestag en 1835 malpermesis la aperintajn kaj eble aperontajn(!) verkaĵojn de Heine, Börne, Gutzkow (gucko), Laube kaj aliaj verkistoj, konataj sub la kolektiva signifiĝo de "Junges Deutschland" (juna Germanujo).

*

Fine de la 18a jarcento la plej granda parto de norda kaj meza Italujo dependis politike de Aŭstrujo, la suda Italujo de Hispanujo. En 1796 Napoleono konkeris la duoninsulon, dividis ĝin en plurajn ŝtatojn, kiujn li vasaligis al Francujo. La Viena kongreso (1814—15) redonis preskaŭ la antaŭan staton: Aŭstrujo ricevis Lombardion, Venecion, Istrion kaj Dalmatujon. La teritorioj de Parma, Modena, Lucca, Toscana, Massa kaj Carrara estis regataj de diversaj branĉoj de la aŭstria Habsburganoj. La Metternicha Aŭstrujo prenis sur sin, ŝirmi tiujn absolutismajn registarojn.

La Bourbono Fernando I, reĝo de Sicilio kaj Napoli, parenca al Habsburg, devontigis sin per sekreta traktato kun Aŭstrujo, ke li ne enkondukos konstitucion aŭ alian ŝtatordon, kiu estus pli liberala ol tiuj de Lombardio.

Kompreneble la "risorgimento" (movado por nacia unuigo)

do sin turnis precipe kontraŭ la Habsburga ŝtato, kiu per helpo de sia armeo subpremis sange ĉiun organiziĝon por liberigo kaj ĉiun ribelon.

Ĉirkaŭ 1800, dum la franca regado, en Napoli fondiĝis la sekreta politika societo de la karbonaroj (karbistoj). Ĝi estis ligita kun la framasonoj kaj prenis de ili grandparte sian ritaron. La celo de la karbonaroj estis la nacia sendependeco de Italujo. Sekve ili batalis energie kontraŭ la despota reakcio de la princaj regnestroj, precipe post 1815. En Napoli ili kalkulis milojn da partianoj kaj ludis gravan rolon en la revolucio de 1820. Sed ili sciis teni la popolamason interne de la baroj de modereco.

Poste tiu revolucia partio en Napoli kaj Piemonte estis venkata, ĉiuj registaroj persekutis la karbonarojn kvazaŭ ŝtatperfidulojn. La movado fine fiaskis en Italujo, sed trovis novan agadkampon en Francujo.

*

Laŭ la supra karakterizo de Börne estas kompreneble, ke la aferoj en Italujo lin forte interesis kaj ke lia tuta simpatio apartenis al la karbonaroj. La sekvanta "rakonto" montras tion kaj lian manieron, trakti politikajn aferojn per tendenca kvazaŭbeletraĵo.

La karbonaroj kaj miaj oreloj

De Ludwig Börne

Kiam mi venis al Milano, videbla ribelemo tie regis. Oni estis sciiginta, ke revolucio eksplodis en Torino. La publikaj funkcioj estis suspektemaj, atentaj, severaj; la kanajla popolaĉo antaŭĝojis pro la venonta malordo. Kelkaj eminentaj civitanoj mienis kvazaŭ gajaj heredantoj, kiuj pro konveneco vidigas afliktan fizionomion.

En Milano mi estis trovinta italan lingvon sed ne italan ĉielon, estantecon sed ne estintecon, kaj mi urĝis por transiri

la sojlon al la paradizo. Interkonsentinte kun iu vetturino (veturigisto) pri morgaŭa vojaĝo al Firenze, mi iris en la teatron Della Scala.

Oni prezentis la operon Othello de Rossini. Ĉar mi sciis pri la idola estimo, kiun en Milano kiel en tuta Italujo oni sentas por Rossini, mi ege miris rimarkante, ke en la tuta salonego oni neniel atentis la prezentadon. Oni ridis, babilis, moviĝis ire kaj reire en la sufiĉe vastaj loĝioj, regalis sin per refreŝigaĵoj kaj nur la ĉielo scias, antaŭ kiu do la gekantistoj penis prezenti sian artecon.

Fine Desdemona aperis kaj oni akceptis ŝin kun aplaŭdado. Ŝi riverencis trifoje: unue antaŭ la kortega loĝio neokupita, poste dekstren kaj fine antaŭ la parteroj. Mi ne scias, ĉu oni ŝatis la kantistinon aŭ ĉu la arion, kiun ŝi estis kantonta: ekregis plena silento, kiam ŝi aperis. Ŝi kantis plenan, tedan kvaronhoron. Mia gorĝo estis kvazaŭ strangolita; mi spiris pli libere nur, kiam el la koloraturoj kaj la pli kaj pli rapidiĝantaj kaj intensiĝantaj paŝoj de la melodio mi konkludis, ke la kavatino proksimiĝas al la finkatastrofa momento. Signora Desdemona do baldaŭ ekstarigis la atakstupetaron por penetri en la breĉon, enkantitan en la korojn de la aŭskultantaro, kaj por konkeri ties aplaŭdon. Brava trilo sin premis antaŭen — oni aŭdis neniun spiron . . . jen kanonpafado tondris!

Ektimigite mi salte levigis de mia seĝo, obtuza murmuro ekbruetis en la salonego, mi aŭdis ke en iu loĝio oni flustras al si en la orelon: "Ĝis morgaŭ ili estos ĉi tie." Mi sentis ke miaj vangoj ekardas, miaj okuloj larme malsekiĝis, ĉiela ĝojo trakuris miajn vejnojn. Kaj ĉar en mi bedaŭrindulo la koro ĉiam atingas ĝis la buŝo kaj unu guto sufiĉas, por ke ĝi superbordiĝu, ĉar fine mi posedas la plendindan kaj ridindan kutimon paroli laŭte kun mi mem: la diablo min instigis, kaj tiel perceptebla, ke oni povis aŭdi min trans du loĝioj, mi kriis: "Es leben die Carbonari! es lebe Italien!" (vivu la karbonaroj, vivu Italujo!)

Zitto! (silentu) kvikis sopranvoĉeto malantaŭ mi; alia, grasa sinjoro rigardis min kun miro; iu bela sinjorino tenis poŝtukon antaŭ sia buŝo. Tamen miaj ribelaj paroloj faris malpli da impresoj, ol oni povis atendi, probable pro tio, ke

oni ne estis kompreninta la sencon de la germanaj vortoj. Sed mi mem estis kompreninta ilin eĉ tro bone, kaj kiam la entuziasmon sekvis pripensado kaj kapdoloroj, kiam mi konsideris pri la loko, tempo kaj cirkonstancoj, tima maltrankvilo okupis mian koron. Mi tremis antaŭ la tribunalo, jam mi antaŭsentis, ke la ekzekutisto kvazaŭ mezurcelas mian kolon, kaj, traktante min eĉ plej indulge, mi devis atendi torturan esploron kaj longdaŭran malliberecon. La plej granda favoro, kiun mia malaŭdaca espero flatis al mi, estis tiu, ke ili gardos min ĉi tie en Milano kaj ne enkarcerigos en la abomena Olmütz¹. Ha! mi ĝemis, se nun vi sidus apud iu ranlageto en la lando Brandenburg, kiom pli bone estus al vi ol ĉe la dolĉa gurdado de signora Desdemona! Ve, malfeliĉulo, kiam la akto finiĝas, la gvardio venos kaj forkondukos vin!

La akto pasis, la gvardio ne venis, kaj, aŭdinte ankaŭ la duan akton per liberaj oreloj, mi komencis trankviliĝi.

La opero estis finita kaj baledo sekvanta. En la silenta intertempo en mian loĝion envenis juna viro, kiu unue konversaciis kun iu kaj tiu kaj, fine perceptinte min, surpriziĝe diris: "Ha, vi ĉi tie!" Li alparolis min per mia nomo. Mi ne memoris pri li, kaj kiam li rakontis, ke li kun mi parolis dum diversaj kunvenoj en N., mi la milan fojon bedaŭris mian malfortan memorkapablon pri nomoj kaj vizaĝoj.

"Mi miras", diris la juna homo, "ke s-ro S. sciigis al mi nenion pri via ĉi-estado". — "Kio!" mi vive respondis, "S. estas ĉi tie?" — "Kaj tion vi ne scias? Jen en tiu loĝio li sidas. Mi gvidos vin tien."

Plezurante, ke tiel surprize mi renkontos unu el miaj plej fruaj amikoj, mi sekvis mian gvidanton. Apenaŭ mi trapasis la loĝipordon, kiam mia servema sinjoro eklipsiĝis kaj ok soldatoj de sarmata² aspekto prenis min inter si. Ili kondukis min en gvardiejon de la operdomo.

Tie oni traserĉis miajn poŝojn kun multe da ĝentileco kaj ekzakteco, forprenis miajn paperojn. — "Se vi bonvolos . . .", diris la policvokto; mi sekvis lin. Antaŭ la domo staris kaleŝo, oni min enirigis, la vokto eksidis apud mi kaj — "Adiaŭ mondo!" grakis post min korva voĉo.

Ĉu mi tremus en batalo? Por paroli sincere: mi ne estas

tute certa pri la malo, sed tion mi scias: nur miaj nervoj tremus, mia animo restus trankvila. Sed eĉ mia senmorta mio estas plena de timtremo, kiam ĝi estas minacata de iu polico. Tro vee estis en mi. La veturilo estis tiel malalta, malvasta kaj hermete fermita, ke mi timis sufokiĝi. Ĝi havis ambaŭ-flanke rondan, per dratplektaĵo armitan vitroplaton, ne multe pli grandan ol lenso teleskopa. La trapasanta lunbrilo desegnis ĉe miaj piedoj reton, en kiu mia fantazio angore baraktis. Mia gardanto apud mi parolis neniun vorton. Eble li okupis sin, interpreti miajn ĝemojn; mi donis al li sufiĉe da laboro.

Post kvaronhoro la veturilo haltis. Mi aŭdis, ke peza pordego brue fermiĝis post ĝi. Oni apertis la kaleŝon. Elirinte mi trovis min en korto ĉirkaŭbarita per altaj muroj kaj okupita de multaj gardistoj. Oni irigis min en la ĉambron de la mallibereja gardisto. Tie oni en libron enskribis mian nomon kaj la priskribon de mia eksteriĝo, kiel oni kutimas fari en pasportoĵoj. Ankaŭ mian subskribon mi devis aldoni. "Numero kvar —" diris la policvokto al la malliberejisto.

Tiu, maljuna viro de vinagra mieno, ekfariĝis post tio afabla kontraŭ mi, eklevetis sian ĉapon kaj alportis al mi seĝon. La policvokto deziris al mi bonan nokton kaj flustris: "Estu bonhumora, via afero ne fariĝos tiel grava". — "Anjo, lumigu al la sinjoro!" vokis en apudan ĉambron la malliberejisto. Juna fraŭlino, tenante kandelon per ambaŭ manoj, supreniris ŝtuparon, mi sekvis, la maljunulo post mi. "Komfortigu al vi!" li diris malŝlosante ĉambron, "kiam vi ordonos vespermanĝaĵon, bonvolu sonorigi".

Li kaj la knabino foriris kaj mi miris, ke ili ne ŝlosis la pordon. Mia miro pliiĝis, kiam, ĉirkaŭrigardante en la ĉambro, mi trovis plej komfortan kaj belan meblaron. Eĉ skribiloj kaj papero ne mankis. La Fera Masko³ ne povis loĝi pli oportune.

Iom retranskribinte post la teruraĵoj de la vespero kaj kiel eble preparinte min por la juĝista esplordemandado, mi komencis konsideri mian situacion de la romantika flanko. Tio reserenigis min. Mi ektiris la sonorigan ŝnuron, por deziri la vespermanĝaĵon. Anjo venis akompanate de la maljunulo, metis la manĝaĵojn sur la tablon kaj antaŭtrancis ilin. Mi ricevis

nur kuleron; la malliberejisto sin eskuzis per la koncerna regularo. La manĝaĵoj estis bonaj, la vino eĉ pli bona.

La maljunulo eliris, Anjo restis ankoraŭ unu momenton en la ĉambro, metis kun signifa rigardo sian manon sur falditan buŝtukon, kuŝantan sur tualeta tableto, kaj tuj poste ŝi metis la fingrojn sur siajn lipojn kaj deziris al mi bonan dormon.

Kiam ŝi estis for, mi ŝlosis la pordon, disfaldis la buŝtukon, sed mi trovis nenion en ĝi. Mi senvestigis min kaj dormis dum tiu nokto pli trankvile, ol oni kutimas en tiaj cirkonstancoj.

Vekiĝinte en la mateno, mi ree ĉirkaŭiris revizie la fortifikajojn de mia senkulpeco, ekzamenis ekzakte ĉiujn ĝiajn punktojn, dislokis celkonvene la batalfortojn de mia defendo kaj plifortikigis tro malfortajn flankojn.

Anjo alportis la matenmanĝaĵon, ŝi venis sen la maljunulo. Ĉu pro mia reakirita trankvilo, ĉu pro la taglumo: nur nun mi eltrovis la mirindan belecon de la knabino, kiun mi senatente pretervidis en la antaŭa vespero. Anjo staris en la sorĉa horo de la virina vivo, kie la virgulino kun ete malfermitaj lipoj aŭskultas je la respondoj, kiujn la naturo donas al ŝiaj demandoj. Rozoj kaj lilioj kune okupis la tronon de ŝiaj vangoj, la blua ĉielo estis nur debrilaĵo de ŝiaj okuloj, sur ŝiaj lipoj estis rideto de dormanta infano, ŝia ora hararo, laca de la propra pezo, interripozis sur ŝiaj ŝultroj antaŭ ol pluondiĝadi — anĝeloj amus ŝin kiel sian fratinnon, sed eĉ diablon la knabino povus delogi.

Kiam, perdiĝinte en admira rigardado, mi senvorte staris antaŭ ŝi, ŝian vizaĝon tike transkuris io, kio subite sendiinigis ŝin, kaj kion mi baldaŭ komprenis pli klare. Anjo traserĉis ĉiujn angulojn de la ĉambro, poste ŝi metis la manon sur la falditan buŝtukon (kiel ŝi faris la antaŭan vesperon), malfaldis kaj agitis ĝin. Mi demandis, kion ŝi serĉas? Ŝi alpaŝis al mi pli proksimen kaj diris rapide kaj time: "Mia onklo estas malmilda homo kaj multe tro severa. Antaŭ nelonge ni havis malliberulon, kiu estis akirinta la favoron de nia servistino. Ĉiumatene li metis leteron en buŝtukon, kiun la knabino, kvankam ŝi iris en la ĉambron akompanate nur de la onklo, nemarkite prenis kun si kaj portis en la urbon. De tiam mi mem

devas priservi la malliberulojn kaj ekzameni ekzakte, ĉu ie ili kaŝis ion skribitan."

Mi demandis Anjon, ĉu ŝi min perfidus, se mi konfidus al ŝi leteron. Ŝi metis la manon sur la koron kaj rigardis min per siaj ĉielokuloj. "Ŝafidino!" mi diris, "knabino tiel juna, tiel bela . . ." — "Bona samlandano", ŝi flustris metante sian manon familiare sur mian ŝultron — "...tiel bela, tiel juna kaj jam tiel koruptita!" — "Serpento!" mi tondris al ŝi — doloro sufokis mian voĉon, mi faligis min sur seĝon kaj fluo da larmoj verŝiĝis el miaj okuloj. —

Kiam mi fortiris la manojn de sur miaj malsekaj okuloj, la knabino estis foririnta kaj la policvokto, mia kondukinto en la antaŭa vespero, staris antaŭ mi. Li vidis mian emocion kaj, miskomprenante ĝin, li denove parolis al mi kuraĝige. "Trankviliĝu do, ne povas esti nia intenco igi vin malfeliĉa. Ni ĉiuj ja estas germanoj . . . delogo . . . senpripensemo . . . blinda entuziasmo . . . Diru nur la veron! Vi povos ankoraŭ akiri meritojn antaŭ la registaro." Mi skuis la kapon. "Ne estas tio, kio okupis min", mi diris "sed ni iru".

Veturilo atendis nin, kaj oni min kondukis al la policejo. La policedirektoro kaj flanke al li protokolanta sekretario jam sidis pretaj. La aŭskultado komenciĝis. Oni demandis min pri mia nomo, mia profesio, pri la celo de mia vojaĝo, miaj konatoj en Milano ktp. Oni ja konas tiun pelĉasadon fare de kruela polico, kie la konfeso de akuzito, kvazaŭ kompatinda ĉasbesto, estas pelata en cirklojn pli kaj pli malvastiĝantajn, ĝis fine ĝi estas atingebla per pafo. Oni demandis min unu horon kaj ankoraŭ ne estis parolinta eĉ unu vorton pri mia efektiva delikto.

Fine venis la decidiga demando: "Kia estis via intenco, kiam hieraŭ en la teatro vi laŭtvoĉe diris: Vivu la karbonaroj!?" — "Kaj 'vivu Italujo'?" aldonis la sekretario. Jen estis la kriza punkto, la fatala demando, eble destina pri mia vivo. Sed tiel problemdona estas la homa naturo, tiel variemaj la malfortecoj kaj vantoj de la koro, ke ankoraŭ mi kapablis pripensi, ĉu mi mensogu kaj lasu min senkapigi, aŭ ĉu mi konfesu la veron igante min ridinda.

Ĉar mi hezitis pri mia deklaro, la demando estis ripetata.

"Mi estas malbonaŭda" mi respondis.⁴ "Bonvolu eksidi" diris la sekretario tre mallaŭte kaj ne alrigardante min. Mi ne volis difekti la plezuron de la ruze sagaca sinjoro, prenis seĝon kaj sidigis min. "Vi estas do malbonaŭda?" kriis la policedirektoro. "Mi estis tia, mi volis diri, mi estis tia ĝis hieraŭ." "Nu?" la sekretario kunigis la tutajn ruzemon kaj malicon, kiuj en li latentis, ĉirkaŭ la nazpinton kaj streĉe atentis.

Mi daŭrigis: "Kiam la sciigo pri la Napolia revolucio venis al Germanujo, mi rapidis iri Italujon . . ." La sekretario sin ĵetis sur tiujn vortojn kvazaŭ vulturo kaj vigle notis ilin. Mi sentis, ke mi parolis malprudente; sed mi estis enirinta la kavojon kaj ne povis min returni. Mi daŭrigis mian parolon: "La deziron vidi Italujon mi havis jam de longe, por ĝin realigi la tempo ŝajnis al mi nun plej oportuna. Oni diris ke la monarĥoj, venante de Vieno, vizitos Romon kaj Napolion . . . festoj . . . sekureco de la vojoj, mallonge: mi decidiĝis fari la vojaĝon.

Sed malfeliĉe mi ne sciis la italan lingvon. Mi taskis al mi, tuj preni kelkajn lecionojn pri tiu lingvo por lerni tiom, kiom estas eble en malmultaj semajnoj. Mi legis italiajn librojn kaj periodaĵojn de matene ĝis vespere. Inter aliaj verkoj mi vidis kajeron de iu gazeto aperanta ĉi tie en Milano. Mi trovis en ĝi rekomendon de rimedo kontraŭ la malakreco de aŭdo, plago, kiu jam longatempe min suferigis.

La rimedo konsistas en tio, ke, fumante tabakon, anstataŭ tuj forblovi la enspiritan fumon, oni tenas ĝin dum kelka tempo en la buŝkavo kaj dume fermas hermete buŝon kaj nazon. Post malmultaj semajnoj da tia procedo la aŭdo revenas. Rusa grafo, rekomendante tiun rimedon, asertas, ke ties efikeco pruviĝis jam ĉe multaj homoj, eĉ tute surdaj. Mi decidis apliki ĝin.

Tri semajnoj mi sekvis la instrukcion, sen sperti plibonfarton. Hieraŭ dum la opero la oreloj forte min doloris. La kaŭzo de tiu doloro nur poste klariĝis al mi, kaj nur tiam mi komprenis, kial la kantado de ĉiuj kunludantoj aperis al mi tiel abomena. Dum bravurario de Desdemona ŝajnis al mi, ke mi aŭdas kononpafon. Mi ektimis, sed baldaŭ kun neespri-mebla ĝojo perceptis, ke en miaj oreloj ŝanĝiĝo okazis. La lando de la tonoj, de kiu ĝis tiam mi vidis nur kvazaŭ kre-

puskon ĉe malproksima horizonto ('tre poezia!' grumblis la sekretario), nun proksima kaj sunhela sterniĝis antaŭ mi. Mi povis aŭdi eĉ plej mallaŭtan flustron en malproksimaj anguloj de la salono — mi estis feliĉa.

Tiam mi ekpensis, kiel strange grandaj kaj malgrandaj aferoj estas interligitaj en ĉi tiu mondo, kaj ke propre mi dankas la reakiron de mia aŭdpovo al la konspiro de Napoli. Vigla mi estas de naturo kaj en mia ĝojo mi pensis pli laŭte, ol estis oportune, kaj mi diris laŭtvoĉe: "Vivu la karbonaroj!"

La sekretario kolere saltleviĝis kaj diris: "Sinjoro, ĉu vi volas moki nin?!" — "S-ro direktoro", mi diris, "la veraĵo, kiun vi aŭdis, estas sufiĉe ridinda; kiel fikcio mia deklaro estus nepre tro absurda. Vi ne taksos min tiel malsprita, ke mi ne kapablus igi mensogon pli kredinda, kaj ne tiel imperinenta, ke mi riskus mistifiki vin per fabelo tiel naivega." — "Ĉu vi persistas ĉe via deklaro?" — "Jes." Post tio la esplordemandado estis finita. Mi devis subskribi protokolon kaj oni rekondukis min en la malliberejon.

Ok tagojn da mizero mi atendis la decidon pri mia sorto. Anjo plu ne lasis sin vidi kaj la maljunulo, traktinte min afable la unuan tagon de mia mallibereco, kondutis malĝentile kaj severe kaj rifuzis al mi multe da oportunaĵoj.

Fine mi estis denove kondukata en la policejon. Oni tie redonis al mi la forprenitajn paperojn kaj mian pasporton kaj avizis min pri mia liberigo. Ĉu oni estis konvinkiginta pri mia senkulpeco, ĉu iuj protekte intervenis je mia favoro, ĉu oni volis indulge trakti min aŭ kio alia donis al mia afero turniĝon pli bonŝancan, ol mi povis atendi — tion mi ankoraŭ nun ne scias.

En la tuta Lombarda—Venecia reĝlando neniuj estis pli ĝoja ol mi. Eĉ la suferita mallibero aperis al mi kvazaŭ gajno, mi ĝin rigardis kiel glaseton da vermo, kiun oni prenas antaŭ la manĝo. Kaj ĉu ne staris antaŭ mi riĉe aranĝita festentablo, ĉu ne bonodoris Romo el ora plado, ĉu ne brilantumis la maro en kristala botelo? Kiam poste oni min avertis, ke mi devos forlasi Milanon ene de dudekkvar horoj, mi respondi plezure: "Morgaŭ matene mi veturos al Firenze."

"Al la diablo vi veturos!" bojis kontraŭ mi dika oficiro, kiun

la lando sube de Enns⁵ grasigis, "turnu vin! marŝ! Vi iros tien, de kie vi venis. De mi vi ne estus eskapinta tiel facile!" Tion dirante, la furiozulo svingis minace la manon, kiu gesto min tremigis de timo. Li ektenis mian pasporton sub mia nazo: "Jen legu!" La pasporto estis vizita al Tirolo kaj la bavara limo, kaj en ĝi estis skribita: "La signito, se li volas eviti areston, restados iuloke ne pli longe ol dekdu horojn kaj ne deflankiĝos de la preskribita vojo."

Kvazaŭ fulmo tiu ordono trafis mian koron; senanimita mi staris. Kiel mi venis hejmen, pakis miajn aĵojn, kiel mi ĵetis min en veturilon kaj rapidis trans montojn kaj valojn, dum tagoj kaj noktoj — mi ne scias. Nur en München mi rekonsciigis.

Tiel, per la vojo de mia veno, mi devis iri returne en la filistolandon! Italujo, miraklinsulo de miaj revoj, tiel mi vidis vin — en sonĝo! Kiu estis tiam, kiu kvietigis miajn dolorojn, verŝis balzamon sur miajn vundojn, kiu sekigis miajn larmojn? Estis vi, fantazio, ĉiela konsolanto, kiu nutras malsatanton en dezerto per manao, kiu panon bakas el arboŝeloj kaj pretigas sukeron el betoj.⁶ Mi dankas al vi, favora diino!

El la germana tradukis

J. Sommer.

¹ Olmütz, ĉeĥe Olomouc, Morava urbo. La epiteto "abomena" rilatas al la *fortikaĵo O*.

² Sarmatoj: nomada gento, loĝis norde de la Nigra maro, pereis en la migrado de popoloj. Laŭ priskribo de samtempuloj ili estis militemaj, forte armitaj kaj de sovaĝa, timiga aspekto.

³ Fera Masko: nekonata malliberulo de Ludoviko XIV, kun nigra masko; mortis en la Bastille de Paris, 1703.

⁴ Heine skribis pri Börne: "La tranĉa malkonfido, kiu subrigardis el ĉiuj liaj trajtoj kaj movoj, eble estis sekvo de la malbonaŭdo, per kiu li suferis jam pli frue, kiu de tiam pligraviĝis kaj ne malmulte kontribuis, por tedi al mi la konversacion kun li."

⁵ Enns, aŭstra rivero, enfluas en Danubon. De antikva tempo ĝi estas limrivero en administracia rilato, apartigante la arkiduklandon Aŭstrujo supre de (ob der) E. de Aŭstrujo sub (mal-supre de) E.

⁶ La produktado de sukero el betoj tiam estis ankoraŭ en stadio de evoluigo. La unua sukerfabriko estis fondita 1801 en Germanujo kaj 1811 en Francujo. Sekve de la militaj perturboj la fabrikado en Germ. stagnis kaj nur post 1820 rekomenciĝis.

Kantoj de l' neĝa kabano

Pli ol iu alia la dana esploristo Knud Rasmussen (1879—1933), mem parte grenlandano, kontribuis al kompreno de la eskimaj popoloj. Li plene majstris ilian lingvon kaj dum multaj, grandiozaj vojaĝoj en Grenlando kaj Nordkanado kolektis centojn da legendoj, fabloj kaj kantoj. Poste li redonis ĉion dane, parte ankaŭ angle, kaj mem poeto li grandskale sukcesis rekrei la fremdan atmosferon de la originaloj.

Neforgeseblaj estas liaj priskriboj de festenoj en kavernoj aŭ neĝaj kabanoj, kie tiu ĉi aparta eskima arto estas prezentata, ĉiam la domo pli malgranda ol la gastamo.

Inter eskimoj oni malofte kantas kantojn de aliaj. Ĉiu havas proprajn kantojn, ĉu viro ĉu virino aŭ foje eĉ infano. Por ĉiu poemo kompreneble estas speciala melodio, kies intervaloj ne ekzistas en la tonsistemo de la t. n. civilizita mondo. La teksto malhavas metrikon kaj rimojn. Ĝia ĉefajo estas la ritmo, kiu estas tiom komplika, ke neeskimaj oreloj malfacilege kapablas distingi ĝin.

Poeto samtempe estas dancanto, tamburisto, kantanto kaj ĥorinstruکیanto, ĉio sen subteno de alfabeto, muziknotoj aŭ papero. Poezio estas afero de peniga rememorado. Tial poeto kutime serĉas solecon sur roko aŭ en vasta ebena. Vagante tien-reen li murmure masonas ideojn en frazojn ĝis plena parkero. Nur kiam la kanto havas firmajn radikojn en la cerbo, la eskima poeto revenas al sia publiko.

Knud Rasmussen en sia kolekto "Kantoj de l' neĝa kabano" humile konfesas, kiom malfacilis transplanti ĉi tiujn verkojn danen. Baroj de miloj da jaroj staras inter la du tiom malsimilaj lingvoj kaj kulturoj. Al skriba traduko mankus preskaŭ ĉio, kio vivantigas la kantojn en ilia malproksima, norda hejmloko. Ne eblas ja redoni la festan tamtamon de tamburoj aŭ ritmon de ĥoroj kun sonoj mildaj, flustraj aŭ kreskantaj ĝis ekstazo.

Simile mi devas deklari, ke nur hezite mi tradukis la apudajn pecojn. Ili ja estas retradukoj, sekve donas malpli ol la reverkado de Knud Rasmussen. Sed ĉar momente neniu eskimo sci-

povas Esperanton, kaj ĉar jam okazis retradukoj anglen, mia malrespekto estas pardonebla.

Al la legantoj apartenas decidi, ĉu etoso de primitiva popolpoezio ankoraŭ restas post ĝia vestigo en Esperanto.

Poul Thorsen

Eskimaj kantoj

Gojo de l' kanto

Ĉarma estas la ago
fari kantojn!
Sed tro, tro ofte
ili fiaskas.

Ĉarma estas la sorto
atingi dezirojn!
Sed tro, tro ofte
ili forvelkas.

Ĉarma estas la ago
ĉasi cervaron!
Sed tro, tro malofte
oni distingas sin
kiel flaman fajron
sur la ebena.

Verkis Piuvkaq, viro de Utkuhikja-popolo, Granda Fiŝrivero.

Nordcervoj

Rampe mi venis senbrue trans marĉo
kun arko kaj sago en buŝo.
La marĉo estis larĝa kaj la akvo glacia,
kaj nenie videblis kaŝejo.
Malrapide mi serpentis
trae malseka, sed nevidebla,
rampe ĝis pafoportuno.

Manĝis la cervoj, ŝiris senzorge la sukan muskon,
ĝis mia sago treme atingis
bruston de vira bestego.
Tiam paniko frapis nesciajn ebenanojn.
Disiĝis la aro,
kurege malaperis
malantaŭ ŝirmaj montoj.

Verkis Aua, viro de Iglulik-popolo, Lyon Inlet.

Kanto de l' vidvino

Kial havas miaj kunhomoj
neniun kompaton al mi?
Peza estos mia dormo,
ĉar la mortiginto de Maŭla
ne montris kompaton?
Ijaja — ijaja.

Ĉu ŝajnas tre strange,
ke doloris,
kaj ke mi kompatis
mian ununuran,
kiam mi ekvidis lin
ĵetitan sur la teron
kun klinita kapo?
Ĝismortaj malamikoj murdis lin,
kaj vermoj malebligas por li
revenon por ĉiam.
Ijaja—ijaja.

Tamen ne sole li
min forlasis,
ĉar ankaŭ mia fileto,
kiun mi amis,
iris al lando de l' ombroj.
Ijaja — ijaja.

Nun mi estas kiel besto
falinta en kaptilon
en propra domo.
Ijaja — ijaja.

Longa estos mia vojo surtere.
Estas kvazaŭ mi neniam sukcesos
malproksimigi la proprajn piedsignojn.

— — —
Povra amuleto
restas mia sola havaĵo,
dum nordlumoj dancas fajroludon trans ĉielon.

Verkis: Qernertoq, virino de Moskbova popolo, Bathurst Insel.
La tri poemojn tradukis laŭ dana reverkajo de Knud Rasmussen:
Paul Thorsen.

Bridi la naturelementojn

De J. Kohen-Cedek

Inter la 7a kaj 14a de majo 1952 gastigis Israel tre gravan konferencon de diverslandaj sciencistoj, kiuj kunvenis konvokitaj de UNESKO por partopreni "International symposium of desert research" (Internacia simpozio pri dezert esploro). Kunvenis ĉirkaŭ 40 mondfamaj fakuloj pri klimatologio, biologio, botaniko de stepvegetaĵoj, specialistoj pri akvumado, tergrundo, hidroenergio k. s. Ili kunsidis unue en Jerusalemo kaj — post ekskursoj en klimato diversaj landregionoj — ankaŭ en Haifa. En diversaj aŭditorioj ili aŭdigis referatojn, interŝanĝis raportojn pri siaj spertoj, opinioj, novaĵoj, kaj resume konkludis pri la decidoj. La temo, kiu okupis ilin, estas la problemo, kiamaniere la homaro povas kaj devas organizite militi kontraŭ la dezertojn por konkerti ilin al homa utilo.

La simpozion prezidis en la nomo de israelaj sciencistoj la mondkonata usona batalanto kontraŭ terdezertiĝo dro W. C. Lowdermilk. Li akiris siatempe mondfamon, kiam la usona

registaro efektiviĝis plenan subigon de la naturfortoj en la valoj de la ŝtato Tenessee kaj ebligis tie vastan koloniigon de la antaŭaj dezertoj — entrepreno poreterne kunligita kun la nomo de tiu sciencisto. Antaŭ la fino de la dua mondmilito dro W. C. Lowdermilk estis invitita de la Cionista Organizo veni al Palestino por konsili pri la akvumadaj rimedoj de sekaj grundoj. Ĉi tie li ellaboris grandiozan projekton, kiu povus unufoje por ĉiam solvi la problemon de akvoprovizado por la tuta lando. Laŭ lia plano marakvo de Mediteraneo devus tra kanalo enflui en Mortan maron, liverante — pro la niveldiferenco — elektran energion, kiu sufiĉus por irigacio de la dezertaj landregionoj, per akvokanaloj kondukantaj el la riveroj, ligataj kun sistemo de digoj kaj cisterno. La Cionista Organizo proponis la projekton al la tiama brita administracio, sed tiu rifuzis permesi ĝian efektiviĝon. La plano restis ĝis nun nerealigebla revo, pro la politika dispartigo de la lando en du ŝtatkorporojn. Tamen sur la efektivebla parto de tiu ĉi projekto estas bazitaj la nunaj irigaciaj laboroj en la lando, kiujn gvidas dro W. C. Lowdermilk.

La landa publikopinio kun bedaŭro konstatis, ke dum la simpozio mankis, pro malsano, la ĉefo de la Agronomia Instituto en la urbo Rehovoth, la landprezidanto de Israel, prof. Ch. Weitzmann.

La kvardeko da sciencistoj kunvenis en Israel ne por helpi al tiu lando solvi ĝiajn problemojn, eĉ ne por trovi helprimedojn al la bono de la propraj patrolandoj. Ili zorgas kaj pledas por savi la mondon de ĝenerala mizerminaco. Ĉar la problemoj, kiu devas okupi la atenton de la tuta mondo, konsistas el konstanta vetkuro inter la homara nombro kaj neekspluetebla tergrundo. La mondloĝantaro pligrandiĝas ĉiujare per 30 milionoj da homoj, dum la kulturata grundo nin nutranta laŭkvante stagnas kaj laŭkvalite iom post iom malboniĝas. En multaj landoj ia dezertoj plivastiĝas, ĉar la pluvakvo forlavas la humon de la montaj deklivoj, la ventoj helpas nudigi la ŝtontavolojn, kaj la tergrundo, pro troa ekspluato, ĝenerale fariĝas malpli fruktodona. Se tiu proceso senhalte daŭros, venos fine katastrofo, kiam la kulturebla tero tro malvastiĝos

kompate al la bezonoj de la plimultiĝanta homaro, kaj malsatmizero estos komuna sorto de la homoj.

La regnestroj zorgas unuavice ĉiu pri la bono kaj la estonteco de la propra ŝtato, ne multe farante por la bono de la tutmondaj, komunaj aferoj. Tial estis memkomprenebla tasko de la Eduka kaj Kultura Asocio ĉe Unuigitaj Nacioj (Unesko) organizi kunagadon de la nemultaj specialistoj de la koncernaj fakoj, por ke ili per interŝanĝo de scioj kaj eltrovoj progresigu la povojn por bridi la terdezertiĝon kaj armi la homaron per necesaj sciencaj rimedoj por konkuri la dezertojn al kulturado.

Jen kial "Internacia simpozio por dezertesploro" interalie decidis rekomendi al Unesko fondi konstantan tutmondan centran institucion por fundamenta esploro de sekaj terspacoj, instigi al Unesko, ke ĝi preparu kaj eduku kadrojn de teknika laborantaro por lukto kontraŭ la terdezertiĝo, ke ĝi stimulu aperigon de gravaj scienc esploroj en tiu ĉi fako, kaj ke ĝi ĉie iniciatu organizadon de landaj asocioj, kiuj akcelu la dezertesploradon kaj eblecojn por koloniigo.

Kun la akcepto de tiu rezolucio finiĝis la konferenco. Ne mankis oficialaj solenaranĝoj. Ĝin malfermis la ĉefministro D. Ben-Gurion (kiu tuj dum la landliberigo fondis ĉe sia ministrarkabineto helpan konsilantaron de diversfakaj sciencistoj), salutis ĝin la Jerusalema urbestro kaj la Universitato, kaj fine, post ĝia fermo, decidis la Teknologia Instituto de Haifa honorigi kelkajn distingigitajn simpozianojn per sciencaj rangoj. Ilin ricevis la franca fakulo dro P. Danel (referis pri "Mezurado de subgrunda akvo"), Sir Ben Lockspeiser, F. R. S. (sekretario de la departemento por scienca kaj industria esploro, en Londono) kaj la usona doktoro L. A. Richards (referis pri irigacio). Ankaŭ kelkaj lokaj sciencistoj distingigis per atentinde gravaj laboroj, kiel la profesoroj F. C. Bodenheimer, J. L. Picard kaj A. Reifenberg. Sed per sciencaj rangoj estis honorigataj nur du, la plej elstaraj: prof. W. C. Lowdermilk kaj Ch. Weitzmann.

Tiu simpozio kunveninta en Israel verdire ne estas la unua tiutema sciencista konferenco. Antaŭis ĝin kelkaj kunvenoj alilokaj. Sed pasintfoje, antaŭ du jaroj, oni decidis kunveni en

Jerusalem. Ne nur ĉar ĝi najbaras al dezerto. Ekzistas ja landoj pli "dezertoriĉaj", eĉ proksime al ni. Tamen la fakulojn allogis nek Bagdad nek Kairo. Por aranĝi tian simpozion estis necesa ne nur apudesto de dezertoj kaj eĉ ne nur urĝa intereso por konkeri ilin por utila uzo sed precipe ekzisto de spertaj fakuloj kaj konvenaj institucioj povantaj okupiĝi pri tia tasko. Ĝuste en Israel troviĝas ĉiuj diritaj kondiĉoj. Krome, kaj tio estas plej grava, Israel jam prezentis sufiĉe altvaloran ekzemplon de koloniigo en dezertigitaj regionoj, ekzemplon, kiu povus servi kiel modelo eĉ por landoj pli evoluintaj kaj riĉaj. Oni sukcesis fari tion ne pro tio, ke la koloniigo sur sablo kaj rokoj estas speciala talento aŭ ŝatokupo de la loĝantaro, sed ĉar la manko de tero devigis nin adapti nin al la landaj cirkonstancoj, same kiel ĝi devigis la nederlandanojn lukti kontraŭ la maro kaj forpuŝi ĝin. Ĝuste tial ni estis devigataj eluzi eĉ tiajn nefruktodonajn terspacojn, kiaj ĉe teroriĉaj popoloj estus tute neglektataj pro sentaŭgeco. La vivnecesoj kaŭzas la kreaajn atingojn kaj la koncernan sperton. La simpozianoj interesiĝis pri klimataj fenomenoj. Ni povis prezenti ekzemplon pri nia akomodigo al la vivdangera klimato de la bordo de Morta maro, montrante al nia potasindustria loko, ne vane portanta la biblian nomon "Sodomo". La aŭstraliano dro B. F. Dickson kaj la hindo Shanti Sarup referis antaŭ la simpozianoj pri stepaj vegetaĵoj. Ni kreskigis fruktĝardenojn sur sablodunoj, kie nun dronas en verdaĵo la urbo Tel-Aviv, kies nomo prave signifas "Printempa monteto". Prof. W. C. Lowdermilk parolis pri pluvforlavo de humgrundo. Ni terasigis montojn. La alĝeriano dro M. G. Drouhin kaj la italo prof. A. Desio parolis pri akvoprovizado. Ni alkondukis per tuboj la riverakvon de Jarkon (apud Tel-Aviv) ĝis la norda parto de la dezerto Negev, kies nomo simbole signifas "Sekforviŝitejo".

Post unu jaro okazos en Jerusalem internacia ekspozicio pri "Lukto kontraŭ la dezertoj". Sed la simpozianoj, ekskursinte tra nia lando, jam plene konvinkiĝis, ke nia lukto kontraŭ la dezertoj dum du generacioj de koloniigo kun ĉiuj ĝiaj suferoj kaj oferoj finfine utilis ne nur al ni mem sed "urbi et orbi".

Debato

Ĉu la mondo progresas?

Jen respondo de J. W. L. al la redakcia komento en la pasinta numero:

Vi komencas vian komenton per la aserto, ke pri la diskutemo homoj povas "senfine paroli sen atingi iun ajn rezulton..." Eble la vero estas, ke vi mem (subkonscie?) ne deziras veni al iu ajn konkludo.

En la debato en la Londona Esperanto-Klubo oni unue difinis la vorton "mondo" laŭ Plena Vortaro.

Pri "konceptoj bazitaj sur faktoj kaj logika rezonado" oni devus ne troigi la "devon" konsideri nur tiajn konceptojn. Ĉu ne eblas per la meditado koncepti aferojn kiujn aliaj homoj nur kapablas (ŝajne) koncepti per "faktoj" kaj (scienca?) "rezonado"? Kiel oni povas klarigi la belecon de rozo, de sunsubiro, de plaĉa vizaĝo, k. s., per faktoj kaj logika rezonado? Oni povus demandi — oni ja demandis — "Kio estas fakto?"

"Pliibonigitaj vivkondiĉoj, pli multe da manĝaĵo..." ja certe estas plej gravaj al la plejmulto de la homaro nuntempe. Oni ja diris, ke la homo ne vivadas sole per "la pano" — sed la homo ne povas ekvivi sen "la pano". Mizerulo kiu ektoleras sian kondiĉon per mensa ĵonglo ankoraŭ ne solvis sian bazan ekonomian problemon: li nur evitas ĝin. Oni ne povas argumenti, ke la amaso da mizeruloj (= malriĉegaj homoj) mem kulpas pro sia ekonomia kondiĉaro. Absurde estus prediki pri religia boneco, k. s., al malsategaj homoj. "Nutru miajn ŝafidojn" estas fundamenta, prudenta ordono de Jesuo Kristo. Antaŭ ol paroli al la amaso li nutris ilin, ĉu ne? Paroladi, prediki pri la aferoj de la animo kaj ignori fizikajn bezonojn estas inversigi la ĝustan ordon kaj malprogresi. Kiam La Eklezio ĉesis koncerni sin pri la teraj bezonoj de la homoj — por ke alia laika instanco faru tiun devon — ĝi erarvagis de sia spirita funkcio. Ĝi akceptis senhonte la rebatan ordonon: "Vi zorgu pri la animoj kaj lasu al ni klopodi pri la cetero." Tiu akcepto estas pruvo de la eklezia malprogreso.

Vi argumentu pri la "enhavo de la vorto progreso..." se vi volas. Mi scias, kun Diodonacita interna scio, kio estas la pro-

greso: sen "faktoj", sen logika "rezonado" mi scias kio estas bona kaj kio estas malbona.

"Vivi" signifas, ke ĉiu homo vivu plene, uzante siajn tutajn fortojn kaj talentojn senkatenite de kondiĉoj metitaj sur lin de aliaj homoj.

La progreso estas esence afero kaj tuthomara kaj individua. Sed la centro, la celo estas la individuo. Ĝi estas tuthomara ĉar la ekonomia (financa) sistemo tiel evoluis, ke la individuo en la aktuala mondo ne povas vivi tute sendepende de la cetero de la socio. Ĝi estas individua en tio, ke la individuo povas esti helpata de la eltrovaĵoj ĉiaspecaj de la aliaj homoj kaj ĉar "novaj" ideoj progresigaj normale venas el la cerboj kaj mensoj de unuopaj homoj.

La situacio estas bildigita bone en jena ŝercrakonto: Hundo en bieno, tra kiu ruliĝis vagonaro kelkfoje, kutimis elkuri el la domo bojegante en la direkto kaj, memevidente, kontraŭ la traruliĝanta vagonaro. Vizitanto hazarde aludis al tiu konduto. "Jes," komentis la farmistino, "li ĉiutage faras tion sed mi ne povas imagi kion li atendus fari kun ĝi se iam li kaptus ĝin". Kion faros la individuo kun la progresvagonaro se li kaptos ĝin?

Fina vorto. Kiam temas pri la sorto de milionoj kiuj vivadas — sen neceso — en ekonomia mizero, en la timo de militado, de senlaboreco, mi ne povas taksi la temon kiel taŭga por nedecidema debatado, aŭ ŝercado, aŭ diletantismo. Ni estu seriozaj kaj decidu ĉu la homaro progresas kaj kiel, unue, oni ebligu al ĉiu homo la avantaĝon de la materia progreso.

J. W. L.

Redakcia respondo.

Mia esprimo "senfine paroli sen atingi iun ajn rezulton" estas ne kontentige preciza. Mi volis per ĝi diri, ke kiom ajn da rezonado pri la donita demando ne donus definitivan respondon. Ekzemple: Ĉu aviado kaj radio estas progreso? En si mem, jes. Ĉu ili ĉiel efikas progresige? Certe ne. Sekve oni devas diri, ke la mondo per tiuj eltrovaĵoj en iuj rilatoj progresas, en aliaj ne progresas aŭ eĉ malprogresas. Al la sama konkludo kondukas preskaŭ ĉiuj demandoj entenataj en la ĉefdemando.

Sed tia konkludo ne estas vera respondo al la donita demando. Tio indikas, ke estus bone anstataŭigi la donitan demandon per aliaj, kiuj pli adekvate esprimus la problemon, kiun oni volas preparoli.

La signifo de la vorto diskuto estas en esperanto, laŭ Pl. V., "interargumenti pri malsamaj opinioj". Laŭ tiu difino oni povus nomi diskuto kiun ajn lukton per vortoj, kaj en la ĉiutaga lingvouzo oni ja tiel faras. Sed se oni traktas seriozan problemon por solvi ĝin, oni laŭ mia kompreno nepre devas rezonadi kiel eble plej logike kaj sur bazo de faktoj. La faktoj ne estas absolutaj, niaj konceptoj ne estas absolutaj, nia rezonkapablo ne estas absoluta. Por atingi la plej bonan rezulton ni tamen devas uzi ilin tiom bone, kiom ni kapablas.

En la ĉiutaga lingvouzo ankaŭ la vortoj opinio kaj koncepto estas uzataj en sufiĉe nepreciza senco. Orda pensado postulas difinitan sencon. Laŭ ĝenerala sencokonscia uzo de tiuj vortoj mi trovas, ke opinio estas la mensa sinteno de homo al iu afero. Ĝi entenas ŝaton aŭ malŝaton, aprobon aŭ malaprobon. Ĝi estas produkto de sentoj kaj eventuale iom da pensado sed pensado sen postulo pri severa logiko kaj laŭfakta rezonado. Koncepto estas difinita (eĉ se ne konscie difinita) pensa ekvivalento de iu afero. Kompreneble ankaŭ koncepto povas esti erara. Malgraŭ tio estas evidente, ke konceptoj estas por rezonado pli valoraj ol opinioj.

Mia rimarkigo en la pasinta numero estis tie nur por atentigi pri la graveco de certa metodo por diskutado. Ju pli malfacila estas iu problemo, des pli oni devas atenti, ke la rezonado estas ĝusta. J. W. L. nun sugestas, ke "Eble la vero estas, ke vi mem (subkonscie?) ne deziras veni al iu ajn konkludo". Ĉu logika rezonado kaj rekomendo de logika rezonado signifas, ke oni ne deziras veni al iu ajn konkludo? Li demandas, kiel oni per faktoj kaj logika rezonado povas klarigi la belecon de rozo, de sunsubiro, de plaĉa vizaĝo. Kiamaniere tio rilatas al la donita demando? Se iu ŝatas rozon, sunsubiron aŭ certan vizaĝon, tiu ŝato estas fakto, uzebla ankaŭ por logika pensado. Ke oni ne povas klarigi, kial li ŝatas tiujn aferojn apenaŭ estas motivo por kondamni logikan rezonadon

en diskutado. Se oni demandas, ĉu la mondo progresas, oni certe demandas pri klarigo. Kial oni alie demandus?

La plej grava afero en la donita diskutotemo ŝajne estas "la pano". Jes, ni faru ĉion kion ni povas, por solvi tiun problemon. Sed se tiu problemo estas la ĉefa afero en la proponita diskutotemo — kial ne formuli la demandon jene: Kion ni faru por doni panon, pacon kaj egalecon al ĉiuj homoj? Tia temo estus pli facile diskutebla.

J. W. L. scias, kio estas progreso, kio estas bona kaj kio estas malbona. La senco de tiuj vortoj estas sufiĉe klara ankaŭ al ni aliaj kaj same ilia rilato al la vivado. Tio tamen ne ebligas al ni respondi per jes aŭ ne, ĉu la mondo progresas.

Lia difino de "vivi" estas danĝera afero. Hitler vivis "plene, uzante siajn tutajn fortojn kaj talentojn senkatenite de kondiĉoj metitaj sur lin de aliaj homoj". Same faris kaj faras multaj grandaj financistoj kaj ankaŭ aliaj homoj. Kompreneble tia laŭvorta interpreto de la difino ne respondas al la pensoj de J. W. L. Sed por Hitler kaj similaj homoj ilia interpreto de la vorto "vivi" estis kaj estas same memkomprenebla kiel la interpreto de J. W. L. estas por li. Kaj aliaj interpretas siamaniere. Ĉu do estas sence difini, kion oni volas diri per la vortoj, uzi la vortojn kun difinita senco?

Pri la progreso kiel afero kaj individua kaj homara mi havas la saman koncepton kiel J. W. L.

La ekonomia mizero de milionoj, la timo pri milito kaj senlaboreco estas temo vere ne taŭga por nedecidema debato, ŝercado kaj diletantismo. Ĉu logika pensado kaj metoda diskutado signifas nedecideman debatadon kaj diletantismon?

S. Engholm.

Esperantisto kaj soldato.

Kapitano H. W. R. Petersen, Nov-Zelando, elprenis unu frazon el antaŭa letero mia, kaj tiel tordis ĝian sencon pro manko de la kunteksto. Mi facile kredas, ke li faris tion tute senintence.

La ĝusta respondo al mia demando, Kial esperantistoj fariĝis soldatoj, estas, ke ili ne povis eviti tion: la demando ĉu oni

fariĝu soldato kiam okazas milito ne estas senkondiĉa demando kiun la individuo povas decidi por si mem senkondiĉe.

La ĝenerala sinteno al la afero rezultas el unu el la ĝeneralaj mitoj. Pro la Historia Mito oni kredas absurdajn aferojn pri antaŭaj militoj kaj armeoj. En lastatempa grava verko, "Human Ecology" (Homa Ekologio), D-ro Thomas Robertson, skribas:

"La universala metodo por akiri soldatojn estis "la timo al la aŭtoritateco kaj la minacoj de la perforto. Oni "ĉiam uzis ĉi tiun metodon kiam la potenco estis sufiĉe centrigita kaj ĝi estas la tekniko de la moderna ŝtato."

"Tiel malmulte la homo estas batalema besto ke se oni ne uzus la perforton kaj la perfidon ne troviĝus multaj bataloj kiujn la historiisto povus kronikigi".

La profesia soldato, asertas nia amiko, "preparas ... kontraŭ malamiko". Ili estas, i. a., tiuj "kiuj tute ne volas kunlabori en libera mondo". Jen troviĝas la mito. Kiu estas tiuj "malamikoj"? Nacio(j)? Senrezerve mi asertas tute ne. La politikistoj? Tute ne. Ili estas regataj de forto kiun ili tute ne komprenas: la internacia financo.

Mi metis la demandon pri la esperantistoj por atentigi, ke malgraŭ la "interna ideo", k. c., la esperantistoj ankaŭ estas homoj kiuj en la realo estas devigataj fari aferojn kiujn ili fundamente preferus ne fari. Do, io pli ol la "interna ideo" kaj la manpremado estas bezonata por starigi la pli bonan mondon.

J. W. Leslie.

Respondo al Nils Christensen

Se N. Chr. relegus mian artikolon "Sendankeco" en n-ro 1/51, li trovos, ke ĝi estis provokita per du antaŭaj disertaĵoj (en n-ro 3/50). Sekve ne estas mi, kiu iniciatis la diskuton pri religiaj aferoj. Sed ŝajnas al mi, ke tiuj ne devus esti tabuaj, kondiĉe ke oni traktu ilin kun la seriozo, kiun ili rajtas pretendi kiel gravega faktoro en la interhomaj rilatoj. Kies religia kredo aŭ konvinko estas tiel facile ŝancelebla, ke ĝi ne eltenas diskuton, tiu prefere ne legu tiajn traktatojn. Neniu ja devigas lin.

"Sed se rabistoj enirus perforte en mian domon kaj patrujon..." Jen vere klasika maniero, konfuzi la faktojn. La araboj do estas invadintoj kaj uzurpantoj al la Palestina lando! Ĉu mi pluokupu min pri tia prezento de faktoj? Prefere ne. Mi turnu min al la principaj demandoj prezentitaj en la letero.

Sed anstataŭ refoje prezenti mian propran koncepton pri la demando, ĉu la eklezio faris bone, kuplante la Novan Testamenton kun la Malnova, mi preferas citi la opinion de elstara anglo, Aldous Huxley, pri kiu Bernard Shaw skribis jam antaŭ pli ol dudek jaroj: "A. H. estas la plej brila spirito de sia generacio. En sia serĉado al la vereco de la aferoj li havas unu avantaĝon super ni ĉiuj: li estas honesta (verama, sincera)". A. H. diras en sia verko "Ends and Means" (Ĉeloj kaj Vojoj), aperinta en 1938:

"En la historio de la kristaneco malfeliĉe ekzistas multaj ekzemploj de refalo en la barbarecon pro neta nescio. La unuaj kristanoj faris la gravan eraron, sin ŝarĝi per la MT. Ĝi entenas, krom belega poezio kaj profunda moralo, la historion de la kruelaĵoj kaj friponaĵoj de batalema popolo, kiu luktis pro sia loko sub la suno, protektate de homosimila genta dio. Kristanaj teologiistoj faris plej grandajn penojn, por doni al tiu tribodio civilizitan kaj moralan vizaĝon, sed la MT, kies ĉiu linio estas inspirita kaj diktita de Dio mem, povis ilin ĉiam refuti. La nescio de la antikvuloj estas sankciita kvazaŭ revelacio. Ĉiuj, kiuj plaĉis al si en sia nescio, kaj same ankaŭ ĉiuj malinteligentaj kaj malkleraj, povis trovi en ĉi tiu provizo de barbara stulto pravigon por ĉia krimo kaj ĉia sensencaĵo. Por pravigi abomenaĵojn, kiel religimilitojn, persekuton al herezuloj, perfidon kontraŭ nekreduloj, oni povis citi referencojn el la teksto de la sanktaj libroj; kaj efektive ili estis ĉiam denove aplikataj dum la tuta historio de la kristana eklezio, por silentigi la neoportunan senton de morala deco. En lasta analizo ĉiaj ĉi sensenceco kaj malboneco estas redukteblaj al miskomprenita mondpercepto. La Hebreoj de la bronza epoko rigardis la integran principon de la universo kiel specon de sublimesa homeca persono, kun ĉiuj sentoj kaj pasioj de la homo. Ekz-e li estis kolereza, ĵaluzo kaj venĝavida. Pro tio oni ne komprenis, kial ne ankaŭ liaj adeptoj estu

koleraĵ, ĵaluzaj kaj venĝemaj. Ĉe la kristanoj ĉi tiu primitiva monddoktrino kondukis al bruligo de herezuloj kaj sorĉistinoj, al amasmurdo de Albianoj, Kataruloj, protestantoj, katolikoj kaj anoj de centoj da aliaj sektoj."

"Mi ne venis por detrui (la leĝon), sed por plenumi." La biblikritiko fare de kleraj, kompetentaj fakscienculoj pruvis, ke la citita loko (Mat. 5,17) estas apokrifa. (Por detale demonstri tion mi bezonus tro multe da spaco en MR kaj krome enuigus iujn legantojn.) Cetere oni ne bezonas multe da inteligento por ekkoni tion, sufiĉas plulegi de 5,20 ĝis 48, kie la dirita estas abolata resp. maligata. Kaj fine: se Jesuo, la nejudo, aramee parolanta Galileo, estis veninta por plenumi la judan leĝon, kial do la skribistoj kaj Fariseoj persekutis kaj mortigis lin?

Jus mi vidis Usonan filmon "David kaj Bat-Ŝeba". Ĝi traktas la adultajn rilatojn de la reĝo kun la edzino de Urija, kaj montras la laŭleĝan ŝtonumon de adultulino fare de homamaso. La popolo postulas tian ekzekuton ankaŭ al Bat-Ŝeba, kion tamen David scias eviti. Sed mi, rigardante, devis pensi pri la sceno en la templo laŭ la Johanevangelio 8,1—11, kie Jesuo (la kvazaŭa plenumanto de la leĝo) diras al la adultulino: mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku.

"Ne faru venĝon kaj ne portu koleron kontraŭ la filoj de via popolo" ktp. (Levidoj 19,18). Laŭ mia kompreno ĉi tiu loko rilatas nur al la filoj de la juda popolo, ne al fremduloj. Ankaŭ "proksimulo" povas esti nur judo. Per la parabolo pri la kompata Samariano (Luk. 10,25—37) Jesuo donis al la vorto alian, ĝeneralan signifon. — Tamen la cititaj vortoj estas tre belaj. Sed nek la Eternulo nek la popolo de li elektita agis laŭ tiuj vortoj. Tro ofte ni legas en la MT, ke Jehova ekflamis de kolero, ke li ordonis: faru venĝon, lasu la vivon al neniu animo, sed ekstermu ilin: la Ĥetidojn kaj la Amoridojn, la Kanaanidojn kaj la Perizidojn, la Ĥividojn kaj la Jebusidojn, kiel ordonis al vi la Eternulo, via (t. e. la juda) Dio.

La bela admono trovis do malmultan atenton. Des pli konata estas la psalmo 137, la venĝopsalmo. Entenas ĝin ankaŭ la breviero por la katolikaj pastroj, kiuj do devige ĝin "preĝas": Filia Babilonis vastatrix, beatus qui rependet tibi

mala, quae intulisti nobis! Beatus qui apprehendet et allidet
parvulos tuos ad petram! Ho ruinigema filino de Babel, beata
(estas) kiu repagos al vi por la malbona, kion vi faris al ni.
Beata kiu kaptos kaj frakazos viajn infanetojn sur roko!

Dum mi estas skribanta ĉi tion, en Den Haag juda delegacio
intertraktas kun germana por fiksi monsumon pagendan al
Israel kaj la mondjudaro. Sed la ortodoksaj judoj ribelis
kontraŭ la decido de la registaro Ben Gurion kaj eĉ celis
eksigi ĝin. Oni atencis la delegitojn, sendante al ili eksplo-
dadojn per la poŝto. La estro de la Irgun Ecel en Tel Aviv
faris sin interpretanto pri la sentoj de la judoj, dirante, ke
ili ne volas materian kompenson sed venĝon! Okulo pro okulo.
Venĝon kontraŭ la kolektivo, la tuta popolo, indiferente, kiu
kulpas aŭ ne. Beata, kiu kaptos kaj frakazos viajn infanetojn
sur ŝtono!

Rudolf Anders.

Abandonacoj por MR 1952.

Jen listo de abandonacintoj (kiuj ne indikis ricevontojn sed lasis
tion al la red.) kaj de la ricevantoj:

Lennart Andersson, Svedujo por T. Ikuta, Japanujo — L. G. Du
Pasquier, Svisujo, por R. Grabsch, Berlin — Nils Henning, Svedujo
por K. Knoll kaj F. Strohfuß, Berlin — A. S. Kane, Usono por
P. Völker, G. Kirchhoff, J. Krogel, E. Imlau, W. Gennert, M. Bey-
kirch, R. Kugland, L. Todt, ĉiuj en Berlino, kaj por P. Kökeritz
kaj R. Zimmermann, en Dresden — T. Nordlöf, Svedujo por R.
Jelinek kaj A. Franke en Dresden. — S. T. Norvell, Kanado por
K. Ikegawa kaj H. Yagi, Japanujo, — B. Åkerberg, Svedujo por
W. v. Waldowski kaj Fr. Brüchert, Berlin, orienta zono.

*

La suma abonnumero de MR estas nun — julio — 402.

Korektoj.

Afable korektu en nro 2/1952: p. 35 l. 15 "ni povas" devas esti
"ni ne povas", p. 36 l. 10 "necese" devas esti "nenecese".